Hr Ejnar Bjerre Jørgensen
Kokborg
Thyregod
96

# Dansk ESPERANTO-BLAD

UDGIVET AF
ESPERANTISTFORENINGEN FOR DANMARK
STIFTET 1908
ELDONATA DE
CENTRA DANA ESPERANTISTA LIGO
FONDITA 1908

Nr. 8

AUGUST 1946 * 18. AARGANG

La Alvoko:

## Esperanto en la dana Radio!

Post multaj vanaj provoj ni fine sukcesis igi la danan radiofonion akcepti disaŭdigon de 15-minuta prelego en Esperanto.

La disaŭdigo okazos la 22-an de aŭgusto de la 22,15 ĝis 22,30-a horo laŭ mezeŭropa somertempo kaj temas pri: Danujo 1946 (diversaj informoj). Ondolongoj:

Kopenhago 255,1 m = 1176 kHz (10 kw), Kalundborg 1250 m = 240 kHz (60 kw). Mallongaj ondoj: 31,51 m = 9520 kHz.

Ni insiste petas samideanojn ĉie aŭskulti kaj raporti al **Statsradiofonien, Kopenhago,** ĉar la nombro de raportoj verŝajne estos decidiga por estontaj sukcesoj ĉe la danaj stacioj; estas tre grave ke multaj skribos, menciante pri aŭdebleco kaj pri tio, ĉu la prelego estas interesa k. t. p. Danku al la stacio, eĉ se vi ne aŭskultis. Helpu la progresojn en la radio!

Centra Dana Esperantista Ligo.

**Dansk-svensk Esperantodag**
***Se Program Side 56***

## Al tutmonda Esperantistaro!

Hieraŭ la 20-an de Julio ni ricevis informon de la dana ŝtata radiofonio, ke oni akceptis nian proponon pri prelego en Esperanto.

Tial ni insiste petas vin: Publikigu la novaĵon en gazetoj aŭ aliamaniere atentigi la Esperantistojn pri la sube menciita alvoko.

La dana radiofonio nome donis al ni 15 minutojn por Esperanta disaŭdigo guste por havi raportojn de la diverslandaj Esperantistoj, ĉar mankas al ĝi raportoj de ordinaraj aŭskultantoj, kaj ni estas promesintaj tiajn, se la prelego okazos. Do, la afero estas urĝa, kaj la rezulto dependas de la raportoj venontaj.

Samideane via
*Centra Dana Esperantista Ligo.*




**Sommerkursus i Helsingør 1946.**

### Interesse for Esperanto.

*I Frankrig har man foranstaltet en Gallupundersøgelse for at undersøge det franske Folks Interesse for Esperanto. Det Spørgsmaal, Franskmændene skulde besvare, lød: Anser De det for ønskeligt, at obligatorisk Undervisning i noget internationalt Sprog, saa som Esperanto, indføres i Skolerne i alle Lande?*

*— Man fandt en positiv Indstilling for Esperanto blandt Flertallet, 65 pCt. svarede Ja, 20 pCt. Nej, og de 15 vidste ikke rigtig.*

*Mange tror, at Risikoen for Krig vil mindskes, at Rejser og Overflytninger til Udlandet vil gaa lettere, og at Handelsforbindelserne fremmes ved Indførelse af Esperanto*

(Efter »Skive Folkeblad«.)

# La someraj kursoj 1946.

***(Iras ni ĉirkaŭ la sankta arbo!)***

***en Hadsten (13.—20 an de Julio)***
***20.—27 an de Julio)***
***en Helsingør 28.—4 an de Julio.***

***Mallonge dirite sukce splena!***

***(Entute visitate de proks. 200 personoj el 6 diversaj nacioj.)***

Pri la unua kurso en *Hadsten* promesis sveda s-ro sendi mallongan raporton — sed ankoraŭ ĝi ne aperis. *Pri la dua kurso* ni ricevis la sekvontan:

## Hadsten, 20-27 a Julio, 1946.

Estas fakto, ke en Hadsten mi estis en Esperantujo en la plej vera senco de la vorto. Tio estis granda, spirita bano por nederlandanino, en kies lando Esperanto dum kvin jaroj vivis sub la akvo.

Plej gravaj en Hadsten estis la sfero, la spirito, la unueco, la intimeco, pro kiuj oni tuj sentis sin hejme, kaj pro kiuj la adiaŭo post nur unu semajno similis al adiaŭo post tutjara kunestado. Kaŭzis tiun unuecon certe grandparte la fakto, ke partoprenis ses diversaj nacioj kaj, ke de la unua momento oni parolis nur esperante. »Policisto« ne estis necesa. Tion kun gojo konstatis s-ro Friis, la eminenta kurs-organizinto.

Oni ne povas mencii ĉiujn faktojn de tago al tago. Mi donos nur ĝeneralan impreson. Koncerne la kursojn, mi povas prijuĝi nur tiun, kiun mi mem ceestis, t. e. la seminario de s-ro Morariu. Gi estas brila, ne nur pro la brila suno sub kiu ĝi okazis, sed pro la sprita, vigla kaj temperamenta instrumaniero, kiu meritas grandan admiron.

Pri la aliaj kursoj, t. e. de s-ino Major kaj f-ino Ida Christensen, mi aŭdis nur laŭdojn de la partoprenantoj kaj, konante la gvidantojn, mi ne dubas pri tio, ke iliaj kursoj estis same spritaj kaj ĉarmaj kiel ilia personeco.

Alian admirindan personon mi ekkonis ci tiun semajnon, t. e. »Soko«, la nelacigeblan kantanton. Kio estus la kurso sen liaj ŝatataj kantlecionoj? Neniam mi lernis tiom da novaj, esperantaj kantoj en tiom da mallonga tempo. Tiuj kantoj treegle vigligis la kunestadon, same kiel la kantludoj, kies puŝantaj fortoj ciam estis »Soko« kaj »Ida«. Rilate al la ludoj, mi devas mencii tre strangan fenomenon, nome la magian forton posedanta »Sankta Arbo«. Mi plu nenion diros pri ĝi, ĉar tiu, kiu ne konfrontiĝis kun ĝi, neniam komprenos, pri kio temas. Mi nur aldonu, ke »Ida« havis tre intimajn rilatojn kun ĝi.

Gravega okazo estis la ekskurso al Aarhus. Mirinde perfekta, esperantista servo funkciis tie. Ni vizitis la »Malnovan Urbon« kaj la modernan, belegan urbdomon. La Aarhus-a grupo estis bona gastiganto kaj ĝi aranĝis bonegan, oficialan kaftrinkadon en la urbdomo. Ne mankis la naciaj flagoj tie. Ni aŭdis multajn paroladojn, atestante veran Esperantismon. Ci tiu sperto plej trafis min kaj plej gojigis min dum mia restado, ke malgraŭ la apenaŭ pasinta, nigra tempo, vivas la vera Esperantismo en tiom da verdaj koroj.

Dankon, koran dankon, Danlando, pro tiu restado kaj pro tiu restado kaj pro tiu sperto.

*Marianne Vermaas,*
Rotterdam.

Pri la kurso en Helsingør:

## Helsingør, 1946.

Estis kvazaŭ mi revenas hejmen, kiam mi vidis la belajn vilaojn inter Kopenhago kaj Helsingør; la 7 jaroj, kiuj intervenis de mia lasta vizito al Danaj Someraj Kursoj malaperis en unu momento. Oni ja ne vidas signojn de la germanaj vizitintoj; mankas la cikatroj, kiuj vidiĝas sur la vizaĝo de la anglaj urboj.

La grupo, kiu venis de Hadsten, alvenis, malfrue sabaton vespere sed tamen afabla servistino donis litaĵon kaj preparis kafon, eĉ aldonis afablan rideton.

La Esperantistoj loĝis ĉefe en aparta domo posedata de d-ro Manniche kaj nur vizitis la Internacian Altlernejon kiam ni bezonis pli grandan halon por danci aŭ prelegi. Mia konversacia kurso estis feliĉe tiom multnombra, ke ni devis ĉiumatene promeni trans la kampojn al la Altlernejo por ricevi sufice grandan klasĉambron.

La kursoj gvidataj de niaj bone konataj Ida Christensen, f-ino Noll, s-ro T. Morariu kaj Willy Petersen sukcesplene okazis en la domo.

Pro malbela vetero, kelkaj el la tradiciaj ekskursoj ne povis okazi, sed la kursanoj tamen povis viziti la kastelon Kronborg merkrede, kaj vendrede posttagmeze faris (t. e. tiuj, kiuj havis la necesajn pasporton kaj vizon) la vojaĝon al Helsingborg.

La salono kun fortepiano estis bonega kunvenejo inter la oficialaj kunvenoj; oni povis rapide descendi la stupojn ĝis la verda herbejo, se oni preferis.

Dimanĉe, la 28an de Julio, la Kopenhagaj gesamideanoj vizitis la kursanojn kaj estis komuna prelegojn pri Spiritismo, kaj la Universala Ligo, faritaj respektive de angla kaj nederlanda samideaninoj, kiuj ambaŭ devis multege klopodi por ĉeesti la kursojn. Jaŭde, oni vizitis kinon kaj, feliĉe por

kelkaj eksterlandanoj, estis filmo parolata en angla (usona?) lingvo.

Ne mankis okazoj por manĝi bonajn, danajn kremkukojn kaj buterpanojn, hejme aŭ en kafeo, kelkfoje eĉ kun muzika akompano kaj dancado. La vegetaranoj ricevis tiom belan tablon, ke multaj »kanibaloj« tuj konvertiĝis.

La dormlokoj estis plej diversaj: dormsalonoj, apartaj domoj, eĉ estis ĉambro en vitra turo.

Entute estis 86 partoprenantoj el Svedujo, Norvegujo, Danujo, Islando, Nederlando kaj Anglujo.

Dum la finfesteno oni aŭdis paroladojn de d-ro Manniche (pri la celoj de la Internacia Altlernejo), de s-ro Friis (por danki al la geinstruistoj kaj gelernantoj — estas ja multe da dankado en Danlando), de la geinstruistoj k a. Unu post la alia, lernantoj leviĝis kaj kun afablaj vortoj prezentis donacon al ĉiu instruist(in)o. Tiuj paroladoj daŭris de la kaftrinkado je la 8 h. 30 ĝis la vespermanĝo je la 11 h. 30 kaj ne finis ĝis la unua horo matene.

Dum tiu postmilita vizito al Danlando mi denove konstatis la grandan gastamecon kaj amikecon de la danoj, ilian afablecon por infanoj kaj maljunuloj, kaj denove mi notis kiom da progreso povas fari Esperantistoj dum unu semajno, kiam ili lernas, manĝas, dormas, serĉas kaj ludas en Zamenhofa etoso inter gesamideanoj.

*Cissie Major*, Londono.

## Autunaj Feriaj Kursoj

**13.-20. de oktober en Idrætsskolen, Vejle.**

Brile sukcesis la aŭtunaj feriaj kursoj en la pasinta jaro. Tial ankaŭ ĉi-jaro la kurskomitato aranĝos tiajn kursojn. F-ino Noll kaj s-ro Friedenbergs prelegas en la Supera Kurso — kaj f-ino Ida Christensen gvidas Konversacian Kurson.

La sporta lernejo situas en belega loko kun multe da arbaroj, kies aŭtuna resto dum la kurstempo havas sian plej belan koloron.

Petu programon ĉe

*L. Friis*, Ingemannsvej 9, Aabyhøj.

## La laborkunsido en Hadsten.

21. Juli 1946.

La ĉeesto de multaj eksterlandanoj krom estraranoj de DLEA donis al tiu kunsido kelkan intereson. Kvankam ne estis programo, tamen evoluis bona kaj vigla interŝanĝo de ideoj. La prezidanto de »Aŭroro« en Reykjavik parolis pri plurlanda loterio, kiu okazu samtempe en multaj landoj por doni monon al nia kaso, ĉar senmone ni ne povas labori. Krome li proponis, ke IEL eldonu broŝuron pri la angla kaj bazangla lingvoj. Ĝi devas esti verkita de anglaj spertuloj, kaj oni sendu ĝin al registaroj kaj parlamentanoj en la diversaj landoj, tradukita en la koncernajn lingvojn. Morariu donis konsilojn por la loterio kaj pledis por energia laboro pri la UNOdeklaroj. Holger Hansen, DELA, diris, ke lia organizo estas preta kunlabori kun Centra, kaj poste, ke plej efika propagando estas fervora uzo de la lingvo. Pluraj parolis pri la filmo kiel reklamilo. Tia filmo devas esti altvalora, ne infaneca kaj naiva. La kutimaj metodoj atentigi ŝin per anoncoj, flugfolioj ktp, plej ofte efikas nur malforte. La venontan radio-disaŭdigon la 22an de aŭgusto ĉijare kaj la internacian SAT-kongreson en Aarhus proksiman jaron ni devas efike utiligi propagande. Tre interesiĝis la eldiro de s-ino Major, Londono, ke la angloj ne deziras la bazanglan lingvon, ĉar estas terure kripligita, pupa angla lingvaĉo.

## *Universala Ligo.*

Dum la kursoj en Hadsten kaj Helsingør multaj geesperantistoj aliĝis al la Universala Ligo, pacifista mondorganizaĵo, kiu per simbolaj brikoj konstruas la Novan Mondon sur bazo de homeco kaj demokrateco. Ĝi estas la unua mondorganizaĵo, kiu akceptis Esperanton kiel oficialan lingvon. Ĉiu Esperantisto do firme subtenu ĝin! Ĉiujn informojn donas la *Centra Oficejo*, Riouw-Straat 172, *Den Haag, Nederlando.*

1 briko = 0,50 kr.

*Marianne Vermaas.*

## Hovedbestyrelsesmøde

afholdtes i Hadsten den 21. juli 1946. Fraværende var Kühlmann og Munch. Følgende Sager blev behandlet: Munch overtager Ledelsen af Foredragsrejserne — Engelbrecht Hansen overtager Vandreudstillingen — Dragsted afslutter Statistikken• — I. E. L. har afvist U. E. A.s Forslag om en Sammenslutning. Forhandlingerne fortsættes. — Foredraget i Radioen. — Propagandabrochuren fremlagt i Manuskript. — Kursus udenfor Aftenskolen afholdes atter i Aarhus, idet man gaar ud fra, at Bidragyderne til disse Kursus ønsker Beløbet anvendt ogsaa i Aar til Formaalet. — Samarbejdsspørgsmaalet: DES har ikke ladet høre fra sig om det paatænkte Møde. Bestyrelsen for DLEA var indbudt og Formanden, Holger Hansen, fremsatte et Forslag i Lighed med det, som er vedtaget i Holland. Forslaget blev vedtaget i Princippet, og der nedsættes et Udvalg (Holger Hansen, Lange og Fink-Jensen), som skal udarbejde Forslagets Enkeltheder. — IEL har faaet Anmodning om at forestaa Spørgsmaalet om Henvendelse til Regeringerne m. fl. om Esperanto i Skolen. — Der foretages et Rundspørge hos Klubmedlemmerne om Ordningen af Centras Økonomi.

## La verda fonto rekomencis flui . . .

La verda fonto rekomencis flui,
Denove nia arbo ekburĝonas;
Ne povis ĝin milita brul' detrui.
Karese nia lingvo ree sonas.

Sur brust' denove steljuveloj brilas,
En vent' sin streĉas la espera flago,
Kaj koroj trile kantas kaj jubilas,
Ĉar venis jam la liberiga tago.

Pereis la tiran', la ul' terura;
La mond', luktinte jarojn senkonsile,
Post lia fal' sin sentas pli sekura,
Kaj la homaro spiras pli trankvile.

Jam ankaŭ Esperanto la katenojn
Disŝiris kaj denove pretestaras,
Proponi al la mondo siajn benojn:
Fruktŝvela estonteco sin preparas.

Ĉu pli majeste eĉ la sun' radias?
Ĉu vere la ĉiel' pli rave bluas? —
Sed unu veron vive ni konscias:
Ke nia fonto riĉe ree fluas.

**Teo Jung.**

# Bonvenon

## al la Dan-Sveda Esperanto-Tago 1946.

Ĉikune ni kore bonvenigas VIN al la dua

***Dan-Sveda Esperanto-Tago en Lyngby***

la bela urbo de la reĝa somerrestadejo.

**Dimanĉe la 8-an de Septembro 1946.**

PROGRAMO:

10,00: SVEDA KARAVANO alvenos al Københavns Frihavn.
10,15: UNUHORAN AŬTOBUSVETURADON en Kopenhago.
11,30: ALVENO AL LA URBDOMO de Lyngby. — Kolektiĝo antaŭ la urbdomo.
11,45: BONVENSALUTO de la Komitato por Dan-Sveda Esperanto-Tago. — BONVENIGA PAROLADO da la urbestro de Lyngby s-ro *Ingv. Nørgaard.*
12,15: KOMUNA MANGADO de kunportita manĝajo en la manĝejo de la urbdomo. Nur kafo kaj trinkaĵoj riceveblaj.
13,50: ŜIPVETURADO al Frederiksdal.
14,30: PAROLADO de s-ro *A. Fridenbergs* el Riga.
15,00: KOMUNA KAFTRINKADO en Frederiksdal Kro.
16,30: REVENO al Lyngby.
17,30: FESTMANGADO en Hotel Rustenborg.
PAROLADOJ - KOMUNAJ KANTOJ - k. t. p.
FINO De DAN-SVEDA ESPERANTO-TAGO.
21,17: Foriro de Lyngby (per elektra trajno).
21,33: Alveno al Stacio Nordhavn (piede al Københavns Frihavn).
22,00: La sveda karavano foriras al Malmö.

*La Komitato por Dan-Sveda Esperanto-Tago.*

---

Klip ud eller kopier nedenstaaende og indsend Tilmeldelsen til Komiteens Kasserer, *L. Vasiljef,* Amagertorv 3, København K. Giro 28940.

Undertegnede tilmelder sig herved til Deltagelse i:

Rundtur i København ........................ Kr. 4,00
Sejltur og Kaffe i Frederiksdal Kr. 3,50
Festmiddag (inkl. Betjening) Kr. 6,90
Jeg ønsker vegetarisk Middag.

(Overstreg det ikke ønskede.)

Tilmelding skal ske senest 30. August.

Navn:

Adresse:..................................

*Komiteen for Dansk-Svensk Esperanto-Dag.*

## La somerkunvenon en Hadsten.

Koresponde al la somera kurso CDEL okazigis somerkunvenon en Hadsten dimanĉon la 21an de julio.

—

Sunbrilo — birdkantado — matenfreŝaj gekursanoj en bela harmonio!

Jen la impreso, kiun ekhavis la gastoj, kiuj alvenis por partopreni la kunvenon.

Multaj gastoj alvenis. — Kompreneble! — ĉar oni ja sciis ke multaj eksterlandanaj gesamideanoj ĉeestis.

Multaj danaj gesamideanoj neniam renkontis eksterlandajn Esperantistojn kaj tial tute nature uzis la okazon konstati, ĉu Esperanto vere estas tia, kia oni rakontis al ili.

Oni konvinkiĝis!

En la laborkunveno, kiu okazis je la 10a antaŭtagmezo parolis reprezentantoj el 7 diversaj nacioj. Ĉiuj parolis la saman lingvon kaj ĉiuj komprenis sin reciproke!

La prezidanto de CDEL s-ro Lange bonvenigis la multajn ĉeestantojn kaj menciis diversajn problemojn diskutindojn.

La viglan kaj fruktodonan diskutadon estas gvidata de s-ro S. K. Nielsen.

La laborkunveno finiĝis je la 12a kaj post la tagmanĝo oni faris promenon tra la arbaron kaj je la 15,30 oni trinkas kafon en la gastejo.

Post la kaftrinkado prelegis s-ro T. Morariu pri Rumanio.

Vigle kaj amuze li prelegis, neniam oni laciĝas aŭskultante lin.

Pro vetero tre malbona — pluvis — oni post la vesperemanĝo kolektiĝis en la lerneja gimnastikejo kie oni kantis kaj ludis sub gvidado de S. K..

La tago finiĝis kaj la gastoj forvojaĝis, travivinte novan neforgeseblan tagon en vera esperantista atmosfero. *Th. A.*

---

***Heroldo de Esperanto***

estas bonega anonca gazeto, ĉar ĝi havas proksimume 1500 abonantojn en 35 landoj, Mendu vian anoncon ĉe

Inĝeniero *L. Jakobsen,*
Caril Etlarsvej 14, Aabyhøj.
Poŝtkonto 54133.

# Referato de »La karavana ekskurso al Norvegujo«.

Kiel certa signo de restarigo de la interrilatoj rompitaj dum la milito, nun la unua dana karavano hejmenvenis de Norvegujo. La karavano vizitis kaj la okcidentan kaj la orientan parton de Norvegujo kaj estis gastoj de la diversaj kluboj kaj la partoprenantoj estis enloĝataj ĉe samideanoj kien ili venis.

La karavano kolektiĝis en Frederiskhavn la 2an de Julio kaj ŝipveturis al Larvik daŭrigis la vojaĝon al Oslo, kie la gastigantoj akceptis la karavanon sur la perono.

La venontan tagon anoj de la osloa klubo montris sian urbon kaj ĝian ĉirkaŭaĵon kaj en la vespero okazis brila festo kun festtagmanĝo en »Frognersæteren« ĉ. 500 m-j super la maro.

Jam je la 4a horo la venontan tagon la karavano devis forlasi la belan urbon kaj la afablajn gastigantojn. En la frua matenlumo ili en 8—9 cent metra alteco, per aŭtobuso, preterpasis pejzaĝojn kies beleco fakte ne estas priskribebla.

De Hönefoss ili veturis per vagonaro al Fluse kaj pasigis tagnokton en luksa hotelo; tie la partoprenantoj havis amikan batalon en la eterna neĝo sur Hardangerjökel, vizitis akvofalon kaj rigardis aron da ĉ. 5 cent boacoj.

La forvojaĝo de Finse okazis tra mejllarĝaj neĝkampoj en alteco de ĉ. 1300 m-j, kaj oni devis preterpasi 199 tunelojn por atingi Bergen, — la ĉiam kantanta Bergen, kie oni estis bonvenigataj de membroj de Esp-klubo de Bergen.

Sabate oni rigardis la urbon kaj vizitis »Flögen« (tre bela 300 m-j alta elrigardejo. En la vespero oni kolektiĝis en privata hejmo kaj festis ĝis longe post la ĉesiĝo de la mallonga somernokto.

Dimanĉe okazis ekskurso al Trollhaŭgen kaj al la domo de Edv. Grieg; en la vespero la Espamikaro akompanis la karavanon al la Haugesundŝipo.

La adiaŭo estis treege solena per parolado kaj kantado.

Post la montrado de la urbo la klubo en Haŭgesund invitis al vespera festo en Odd-fellow-domo.

Tiu ĉi kunveno pliinterskandinaviĝis pro la kunesto de du svedaj Esp-istoj ges-oroj Carrfos de Stockholm.

La turist-propaganda-direktoro bonvenigis kaj parolis pri Haŭgesund kaj la ĉirkaŭaĵo en treege amuza maniero; post la prelego oni dancis kaj kantis.

La venontan tagon oni komencis la lastan parton de la vojaĝo al Saŭda. Tie oni dum la dutaga restado vizitis elektrecan stacion kaj faris ekskurson al Slettedalen de kie oni rigardis la paŝtejojn kaj vespere partoprenis en tre agrabla festo, kie anoj de la klubo regalis per muziko kaj kantado, post la bonaranĝita kaftablo.

Post la Saŭda-vizito komenciĝis la hejmvojaĝo, kaj la partoprenantoj travivis la vojaĝon ne kiel ordinaraj turistoj, kiuj nur rigardas la belecon de la lando, sed ili spertis ke en la fremdaj regionoj, kies pompan belecon ili admiris, kaj kiu ŝajnas al ili aventuro, tie ankaŭ vivas homoj, kiuj malgraŭ la malfacilaĵoj de la ĵus finita milito klopodis — ~~kaj sukcesis~~ krei por la karavano neforgeseblajn horojn.

Certe oni tial bone komprenas, ke multaj amikaj rilatoj estas kreitaj inter la anoj de la 2 nacioj dum la 12 taga restado en Norvegujo. Kiel gvidanto funkciis s-ro instruisto S. K. Nielsen, kies lerteco tiurilate ĉiuj jam konas.

17 — 7 — 1946.

*E. P.*,
Kopenhago.


# Dankon al la dana Norveguj-karavano!

Hejmenveninte de la aventura kaj nepriskribeble bela Norvegujo kun la ĉarmaj kaj afablaj Esperantistoj mi sentas emon danki ĉiujn membrojn de la karavano pro bona kaj agrabla kunesto tage kaj nokte, sur ŝipoj, en trajnoj kaj en aŭtobusoj, sur la altaj montoj kaj en la profundaj valoj, dum promenadoj kaj dum festoj! Ĉiam kaj ĉie vi kunportis vian veran Esperantistan humoron. Kaj en Oslo, kiam vi eksciis, ke ni la venontan matenon devis forveturi jam je la 4a, vi eĉ ne montris »acidan vizaĝon«; ĉiam via humoro brilis kaj lumis. Esti gvidanto por tia karavano estas facila afero.

Se la vojaĝo sukcesis — kaj laŭ la eldiroj de multaj partoprenantoj ni povas jesi tiun demandon — la impona, majesta, norvega naturo, la karaj kaj gastamaj norvegaj gesamideanoj kaj vi 20 danaj partoprenintoj kaŭzis la 99 procentojn de la sukceso kaj mi mem nur 1 procenton! Do, karaj karavananoj: Koran dankon pro la 12 taga kaj nokta kunestado kaj koran bonvenon alian fojon!

*Turisma oficejo de*
*Centra Dana Esperantista Ligo.*
*S. K. Nielsen.*

**Pripensu:**
Vi deziras afablecon? Estu afabla.
Vi deziras veron? Estu vera.
Kion vi donas de vi mem, vi trovos.
Via mondo estas reflekto de vi.
El »La juna vivo«.







Ĉi tiuj belaj libroj, la 2-a kaj 3-a volumoj de Literatura Klubo Stelo-Libro estas haveblaj ĉe Libro-servo de CDEL. Vidu la reklamilon enmetitan en la antaŭa numero de DEB.

## La somera kunveno en Silkeborg la 29—30'a Junio

fariĝis granda sukceso. La vetero ne estis subteninta la homan optimismon, sed spite al la minacoj de la klimato la nombro de la partoprenantoj estis granda. Ĉeestis anoj el Aarhus (10), Herning (4), Holbæk (1), Vejle (2), Videbæk (3), Herborg (1), Aalestrup (1), Spjald (1), Ikast (6), Fredericia (4), Randers (1), Falling (1), Toustrup (1), Skive (1), Nr. Onsild (2) + granda nombro de Silkeborganoj.

La centra persono ja estis la sola eksterlandano d-ro Friedenbergs el Latvujo, sed alia persono ankaŭ donis al nia kunveno specialan brilon, nome s-ro Holger Hansen, Holbæk, kiu ekhavis la bonegan ideon tiamaniere venĝi sin al la jutlandanoj, kiuj ne venis al la jarkunveno en Holbæk. Bona kristana maniero! Forigu malbonon per bono! malhelon per lumo! Holger Hansen fondu skolon!

Sabate vespere je la 20-a en brila vetero (ĉar la dioj de l' vetero evidente nun pentis!) oni boatveturis al »Gl. Hattenæs«, kie atendis nin agrabla dancejo kaj bonega muziko, kaj kie ni estis bonvenigataj de s-ino Mary Carlsen. Post kelkhora kaj tre vigla dancado, kiu vekis grandan miron en la koro de d-ro Egerrup, kaj en kiu partoprenis membroj de la loka asocio por popoldancado, kiuj brile kontribuis al la vervo de la festo, ni iris al la lagbordo, kie oni en la lumo de brulŝtiparo auskultis kantojn de 4-voĉa ĥoro starigita de la klubo en Silkeborg. Tio certe estas io tute nova. Ĉu iu alia espklubo havas ion similan? — Sekvis flutmuziko akompanata de harmoniko. Ĉio tre bela kaj harmonia.

En la bela nokto ni piedveturis tra la arbaro al la urbo. Belega vespero!

Dimanĉe matene (je la 9-a kaj kvarono) la plej laboremaj el ni havis laborkunvenon, kiun gvidis d-ro Egerrup. Ĝi temis plejparte pri la eterna problemo PROPAGANDO.

Poste ni tagmanĝis kune, kaj nun oni iris al la ŝipo por viziti la belan lokon »Svejbæk Færgegaard«. Tie atendis nin la kaftablo, kaj post ĝi ni aŭskultis prelegon de d-ro Friedenbergs: »Ĉu la paco estas ebla?« — Ĝi estis ne nur interesa kaj instrua, sed tre vigla kaj spiritplena.

Poste ni ludis sur la kampo, kaj post la vespermanĝo, dum kiu parolis Holger Hansen, kiu esprimis sian dankemon al la Silkeborganoj, ni revenis boate al Silkeborg. Kvankam la vetero nun ne estis tre brila, ĝi tamen estis bona, kaj la veturado estis humorplena kun vigla kantado, en kiu partoprenis ankaŭ kelkaj el la ceteraj pasaĝeroj sur la ŝipo.

En bonega humoro, kvankam iom lacaj ni »ĝisrevidis« ĉe la ŝipo kaj en la fervoja stacidomo, antaŭĝojante al la venontaj aranĝoj esperantistaj de tiu ĉi somero.

*H. E. J.*

---

## Friis' Lærebog i ny Udgave.

Dansk Esp-Forlag har lige udsendt 6. Udgave af Friis' populære Lærebog. Den vil tilfredsstille selv den mest kræsne Esp-Lærer eller Esp-studerende, fordi Forfatteren radikalt har omarbejdet Bogen. Nogle Lærere fandt den systematiske Gennemgang af Fonetiken i Begyndelsen af Bogen i de tidligere Udgaver for kedelig. Dette er helt ændret i 6. Udgave. Begyndelsen af Bogen giver de nye Elever Appetit til Studiet af Sproget. Desuden har Forfatteren efterkommet det Ønske, at Gloserne maatte anbringes bag i Bogen, og at der maatte tilføjes noget mere Stof til mundtlig Øvelse.

I det hele taget opøver den meget større Talefærdighed end de tidligere Udgaver, saa den delvis erstatter et Cseh-Kursus paa Talefærdighedens Omraade. Men det har bevirket, at Bogen er forøget med ca. 25 %, og det igen paa Prisen, saa den nye Udgave koster 4,00 Kr.

Det anbefales Kursuslederne at se den nye Udgave igennem, før de bestemmer sig til Vinterens Lærebog. — Den faas ved *Libro-Servo* eller direkte fra *Dansk Esp-Forlag, Aabyhøj.*

## Al aŭtoroj de eldonaĵoj en Esperanto!

Por eviti, ke eldonaĵoj en Esperanto enhavu lingvajn erarojn, ni rekomendas, ke aŭtoroj en Danujo antaŭ la presigo sendas la manuskripton al lingva kontrolo de la kontrolkomitato de FLE, kies reprezentanto en Danujo estas s-ro instruisto L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj. La komitato postulas decan pagon por la laboro, sed la aŭtoro rekompence havos altvalorajn helpon kaj konsilojn pri la lingvo. Ankaŭ Lingva Komitatano, s-ro d-ro Paul Neergaard, Gothergade 158, København K, donas laŭ la devo de sia posteno konsilojn pri la Esperanta lingvo en manuskriptoj, se oni petas lin.

Do, lasu viajn verkaĵojn lingve kontroli antaŭ la eldono, por ke la Esperanto lingvo en ili estu laŭeble senriproĉa, tio estas en la intereso de la tuta Esperantomovado.

*La ĉefestraro de CDEL.*

---

## Radio.

*Dimanĉe:*
21,00—21,30: Praha (25,34 m)
*Lunde:*
21,00—21,30: Praha (25,34 m)
22,50—23,00: Praha (470,2 m)
*Marde:*
21,00—21,30: Praha (25,34 m)
22,50—23,00: Moravska Ostrava (325,4 m)
*Merkrede:*
18,00: Sofio (352 m)
21,00—21,30: Praha (25,34 m)
22,50—23,00: Praha (470,2 m)
*Ĵaŭde:*
19,05: Svisujo (47,28 m)
21,00—21,30: Praha (25,34 m)
22,50—23,00: Praha (470,2 m)
*Vendrede:*
21,00—21,30: Praha (25,34 m)
21,45—22,00: E. A. J. 14 (Hispanujo) 200 m)
22,30—22,45: B. N. R. O. (Belgujo) (202,3 m)
*Sabate:*
20,30—20,45: Aŭstralio (ĉiun duan sabaton) (235 m)
21,00—21,30: Praha (25,34 m)
22,00—22,30: P. R. I. 3 (Brazilo) (49,75 m)

---

**Ĵoĉjo Akuratulo.**

Servisto: »Mi kalkulis tiujn nombrojn dekfoje, sinjoro.«
Ĉefo: »Bonege!«
Servisto: »Jen estas la dek rezultatoj.« El »La juna vivo«.

## Nia hejma movada

### Lotumado.

»Fredericia Esperanto Klub« antaŭ kelka tempo ekhavis la ideon starigi lotumadon por ekhavi monon por la estonta laboro por Esperanto. La lotumado nun efektiviĝis tiel, ke la rajto pere de la polico estas atingita, kaj ni jam presis 5.000 lotojn, kaj ni esperas, ke kiam vi legas tiujn liniojn, jam granda parto estas forvendita. Sed 5.000 lotoj estas multaj, kaj tial ni petas vin, karaj gesamideanoj, helpi nin en la disvendado de la lotoj. Ili kostas po 50 oeroj, kaj ili enhavas grandajn kaj valorajn premiojn. Entute estas 40 premioj kaj inter ili: nova biciklo, sinjorina subvestaĵo (silko), 8-taga vojaĝkarto al D. S. B., manfarita tuko por kaftablo, duona skatolo da cigaroj (transoceana tabako), 50 anglaj cigaredoj, du paroj da silkaj strumpoj por sinjorinoj, du grandaj skatoloj de vera ĉokolado, fotoaparato, libroj, k. t. p., k. t. p. Entute estas premioj je la valoro de 800 kronoj.

Jam ĉiuj niaj membroj disvendas (-is kaj -os) lotojn, kaj ni esperas, ke ankaŭ multaj eksterurbaj gesamideanoj volas helpi en la disvendado de la lotoj, ĉar per tio vi helpas ankaŭ al »Centra« — ĉar ni dividos la profiton tiel, ke nia klubo ricevos la duonan sumon kaj »Centra« la alian duonon. Kaj nia ideo do estas, ke ĉijare »Fredericia Esperanto Klub« faras la lotumadon, kaj venontan jaron du aŭ tri aliaj kluboj faros la saman, tiel la kluboj helpas kaj sin mem kaj »Centra«n. Do, ne nur la lokaj Esperantistoj estas interesitaj en la afero, sed ĉiuj anoj de »Centra«! Tial, skribu tuj al la suba adreso por peti kelkajn aŭ multajn lotojn. La lotoj estas faskigitaj en faskoj po 20. Tiamaniere ni ĉiujare povos havigi al »Centra« belan sumon. Do, ek al la skribotablo kaj ek al la disvendado de lotoj! ! ! Grandaj problemoj kuŝas antaŭ ni, kaj mono estas bezonata por solvi ilin!

*Fredericia Esperanto Klub,*
c/o S. K. Nielsen,
Havepladsvej 136, I.

**Fredericia.**

Por la 9-a de majo la estraro estis invitinta la lernantojn, kiuj vizitis elementan kurson dum la pasinta vintro, por »Konfirmacia festo«. Tio okazis en la hejmo de nia prezidanto S. K. Nielsen. Dum la vespero ni ludis kaj kantis, la komencantoj kaj demandis kaj respondis bone en Esperanto. Post tio ni sidiĝis nin ĉe bela ornamita kaftablo, kie s-ro S. K. Nielsen rakontis pri d-ro Zamenhof kaj la Esp.-movado kaj organizo. Fine ni kantis la cseh-kursan finkanton kaj vesperkanton.

— La konstitucian tagon, la 5-an de junio, nia klubo aranĝis »Ekskurson al Røjle«.

La vetero estis tre malbona, pluvis kaj ŝtormis; sed ĉar la Esperantistoj ĉiam estas optimistaj, ni tamen ŝipveturis al Røjle, kaj promenis tra la arbaro al la restoracio »Klinten«. Tie ni trinkis kafon kaj kantis.

Malgraŭ la malbona vetero partoprenis multaj samideanoj eĉ de Latvio kaj Kolding.

— La 20-an de junio nia klubaranĝo estis »Pieda ekskurso al »Fuglsang«.«

Je la 19-a ni ekiris al Fuglsang, kie ni ludis per kegloludo. S-ino Esther Petersen venkis je la virina flanko kaj s-ro Aage Antonsen venkis je la vira flanko. Post tio ni ludis en la bela naturo, ĝis kiam ni sidigis nin ĉe la kaftablo, kie s-ro S. K. Nielsen bonvenigis la ĉeestantojn, speciale s-ron Fridenbergs, Latvio kaj ges-rojn Kühlmann, Kopenhago, poste nia prezidanto mallonge raportis pri la jarkunveno en Holbæk, kaj distribuis premiojn al la gevenkintoj de la kegloludo. Fine s-ro Fridenbergs distris nin per siaj travivaĵoj.

28 partoprenis en la ekskurso.

**Randers.**

7/5. S-ro Grønborg rakontis al ni pri sia vojaĝo al Argentino, pri sia cstado tie kaj sia reveno al Danujo. F-ino C. Nielsen tradukis. Poste s-ro Bagge intervjuis s-ron Grønborg pere de interpretisto. Post tio ni laŭtlegis el la libro »La forto de la vero«. La saman vesperon ni decidis pagi du oerojn por ĉiu minuto, kiam ni venos malprecize al niaj klubkunvenoj.

21/5. S-ro Bagge rakontis pri eksterlandanoj kiujn li renkontis, kelkajn el ili li bone memoris, precipe unu, kiu multe parolis pri sia lando, mistera lando, kie troviĝis la plej nekredeblaj aferoj. S-ro Larsen tradukis. Poste ni laŭtlegis el »La forto de la vero«.

4/6. S-ro Bagge daŭrigis sian rakonton pri la mistera lando, kaj ni laŭtlegis el »La forto de la vero«.

25/6. F-ino A. Nielsen rakontis pri la jarkunveno en Holbæk dum la pentekosto. S-ro Bagge finis sian rakonton pri la mistera lando. F-ino Larsen tradukis. Poste ni laŭtlegis el »La forto de la vero«.

10/7. Ni festis en la hejmo de f-ino A. Nielsen por nia monpunujo. Unue ni manĝis multe da fragoj kun kremo. Poste ni ludis diversajn ludojn kaj fine ni manĝis tre bonegajn buterpanojn kaj trinkis bieron k. t. p. Estis bonega vespero. F-ino A. Nielsen estas bona mastrino.

*C. N.*

**Kopenhago.**

12/6 la klubo faris vesperekskurson al »Fælledparken«, kie ni promeninte ludis sub gvidado de s-ino Kühlmann. Poste la membroj kolektiĝis en la hejmo de nia gastema membro f-ino Ida Christensen. Tie ni trinkis kafon, kaj post la kaftrinkado ni aŭskultis raportojn de la jarkunveno en Holbæk. Tiamaniere ni pasigis bonan kaj agrablan vesperon en amika rondo.

30/6 nia tre ŝatata membro s-ro Jul. Petersen aranĝis ekskurson al Lejre — Herthadalen. Laŭ invito ankaŭ partoprenis membroj de la klubo de Roskilde, kaj ni dankas ilin pro ilia ĉeesto. Unue ni rigardadis la akvoprovizejon de Kopenhago. Estis tre interese vidi tiujn modernajn gigantajn pumpmaŝinojn. De tie s-ro Petersen gvidis nin tra arbaroj, kamparoj kaj parko, kaj laŭlonge de nekonataj vojoj kaj vojetoj en la bela selanda naturo. Kiam ni laciĝis ni manĝis lunĉon, kaj pli poste rigardinte multajn belajn lokojn ni finis la promenadon. Fine ni trinkis kafon en »Schweitzerhytten« apud Knap Sø, kaj de tie ni revojaĝis al la urbo. La tago estis sukcesplena kaj pro la zorgema plano de s-ro Jul. Petersen kaj pro la bonega vetero.

10/7 ni faris vesperekskurson al Hareskov, en kiu partoprenis nia islanda samideano s-ro O. Magnusson. Post la kaftablo en »Aldershvile« s-ro Magnusson faris paroladon pri la islanda esp.-movado, kaj donis al ni multajn interesajn informojn. Noktmeze ni reveturis en la bela somernokto.

28/7. Frumatene granda aro da K. E. K.-anoj vojaĝis al Helsingør. Dum kiam kelkaj el ili banis sin en ~~la freŝa maro~~, aliaj ĝuis la sunbrilon sur la marbordo. Manĝinte lunĉon ni vizitis »Holger Danske«n en la kazemato de Kronborg kaj rigardis la aliajn vidindaĵojn de la kastelo. Posttagmeze ni iris al la internacia altlernejo, kie ni kolektiĝis kune kun la kursanoj. Ni pasigis belan posttagmezon tie interparolante kun gesamideanoj el diversaj landoj.

Estas granda travivaĵo denove renkonti aron da eksterlandanoj en nia rondo. Kun multaj bondeziroj por la unua vera internacia kurso post la milito, ni revojaĝis al Kopenhago post tago plena de novaj impresoj.

*H. Jordan.*

### Literatura konkuro.

*Internacia legolibro* aperos eble post kelkaj monatoj, kaj por havigi al si bonajn internaciajn artikolojn, »The Esperanto publishing company litimed« proponis konkuron. La gajnintoj estas s-ro Schwerin, Aŭstralio kaj s-ro Gerdman, Stockholm, Svedujo, sed krom tio oni deziras presigi kelkajn el aliaj insenditaj artikoloj i. a. unu de d-ro Egerrup, Aarhus. La artikolo, kiun li skribis, temas pri dana butero.

18. Aargang. Nr. 8. Pr. Nr. 35 Øre. August 1946.

Redaktør: Frk. Ida Christensen Jagtvej 179, St. tv. København Ø (ansvarhavende)

# Dansk Esperanto-Blad

Officielt Organ for Esperantistforeningen for Danmark
Oficiala organo de Centra Dana Esperantista Ligo

Ekspedition: Christiansborgvej 1, Randers Giro: 57370

## Centra Dana Esperantista Ligo

er tilsluttet Verdensorganisationen »Internacia Esperanto Ligo« (IEL) og optager danske Esperantoklubber samt Enkeltmedlemmer (Izoluloj). Kontingentet udgør for Klubmedlemmer 4 Kr. og for Enkeltmedlemmer 5 Kr. aarlig inkl. Abonnement paa Dansk Esperanto-Blad.

### CDEL's Hovedbestyrelse

| | |
|---|---|
| *Formand* | O. C. Lange, Oppermannsvej 17, Odense, Telf. 4099 |
| *Næstformand* | Dr. H. L. Egerrup, Brendstrupvej 11, Aarhus. Telf. 47. |
| *Forretningsfører* | Frk. J. Larsen, Christiansborgvej 1, Randers, Giro 57370 |
| *Undervisningsleder*<br>*Korrespondancekursus*<br>*Arrangør af Stævner,* | Fru Tinne Nielsen, Havepladsvej 136, Fredericia. Telefon 774 (kan benyttes). |
| *Leder af Libro-Servo* | G. Kühlmann, Pr. Jørgensgade 4 A 2, København N, Giro 13652 |
| *Arrangør af Foredrag* | Mogens Munch, Mariendalsvej 94, København F. |
| *Annoncevirksomheden* | Frk. Gudrun Raphael Jensen, Aalstrup Skole, Falling, Tlf. Falling 36 |
| *Sekretær* | Fink-Jensen, Svalehøj, Kongsvej, Grejsdalen, Vejle.<br>Lærer H. E. Jensen, Byskolen, Taustrup. |

### Andre Adresser

| | |
|---|---|
| *IEL's Repr. (ĉef-delegito) for Danmark* | Chr. Hougaard, St. Blichersvej 43, Aabyhøj. Telf. 242. Giro 65236. |
| *Pressetjeneste* | Alfred Christensen, 6. Julivej 45, Fredericia, Giro 84906 |
| *Form. for Kursuskomiteen, Form. for DLEA's og CDEL's Eksamenskommission* | L. Friis, Ingemannsvej 9. Aabyøj, Telf. 341 |
| *Turisma oficejo* | Lærer S. K. Nielsen, Havnepladsvej 136, Fredericia. |
| *Brugte Frimærker* | Werner Christensen, Prangervej 52, Fredericia. |
| *Redaktør* | Ida Christensen, Jagtvej 179 St. t. v., København. |

## Ŝakludo kaj Esperanto.

Multaj Esperantistaj ŝakludantoj certe deziras ludi korespondŝakon kun gesamideanoj en aliaj landoj, kaj nun la okazo venas. En la »Internacia Korespondŝaka Ligo« (IKL) (angle: International Correspondence Chess Association) oni starigis Esperanto-fakon, kiu organizos turnirojn individuajn aŭ interlandojn. La 1-an de Aŭgusto 1946 komenciĝis la unuaj 3 grupoj kun entute 21 ludantoj de 9 landoj. Ankoraŭ oni ne havas klasojn laŭ forteco, ŝed estas la intenco fari »majstran« grupon el venkantoj de la antaŭaj grupoj. Ĉiuj Esperantistoj, kiuj volas partopreni estas petataj anonci sin al la turnirgvidanto d-ro V. Foigt, Zlonice, Ĉeĥoslovakio. Nova grupo komenciĝas tuj kiam 7 partoprenantoj anoncis sin. La kotizo estas 5 danaj kronoj. Anoncu vin tuj por kreskigi la Esperanto-fakon, kaj rakontu al viaj amikoj, kiuj ŝakludas, pri la uzebleco de Esperanto en la internacia korespondŝako.

*Ejnar Bjerre Jørgensen,*
Grønningen 4, Thyregod.

## Deziras korespondi.

*Aŭstrio.*

S-ro Johano Hajny, Wien XVI Grundsteingasse 3416, kun fotoamatoro.

S-ro Pitterle Leopold, Wien X/75 Holzknechtstr. 103, 49-jara desegnisto.

F-ino Mitzi Umnik, Salzburg, Augustinergasse 26a/I, 40-jara.

D-ro Lutz Kaspar, Stizia, Pürgg, Ennstal, 72-jara, kun samideanaj ĉiuagaj.

F-ino Lisl Oberlechner, Saalfelden 219, Salzburg, 39-jara ĉeflerneja instruistino.

S-ro Johano Javernik, Voitsberg, Hauptpl. 54, Steiermark, dez. korespondi kaj interŝanĝi bildkartojn kaj poŝtm.

S-ro Rudolf Öller, Molln Steiertal, O. Ö.

*Aŭstralia.*

Mr. Edward Courthope, 87 King George Street, South Perth, Western, Aŭstralia.

*Germanujo.*

Walter Kraŭse, telegrafisto, Oldenburg Allé 18 I, Berlin-Charlottenburg 9.

**En Del indsendte Artikler fremkommer først i næste Nummer.**

### Internacia Katolika Informejo.

Ĉiuj kiuj volas scii ion pri la katolika religio, povas ricevi senpagajn informojn ĉe la I. K. I.-Sekretariejo, Fraterhuis, Loonopzand (N.B.), Nederlando.

*Fr. M. Monulfus,*
I.K.I.-Sekretario.

»Ĉu vi deziras korespondi?« M. Noll. Gode Raad for korrespondancelystne. Send den til Deres Venner i Udlandet. Pris 0,35 Kr.
Faas hos Klubsælgerne eller hos *Libro-servo,* Pr. Jørgensgade 4 A II, København N. Giro 13652.

☆ Esperanto-BOGTRYK
Indhent Tilbud gratis og uden Forbindende hos Sønderjyllands ældste og største Bogtrykkeri —
MODERSMAALETS Trykkeri
Haderslev - Telefon 2031

**Centra Dana Esperantista Ligo's Korrespondancekursus**
12 Lektioner 10 Kr. — Prøvelektion og Oplysninger ved *Fru Tinne Nielsen,* Havepladsvej 136¹, Fredericia.

A/S Modersmaalets Trykkeri - Haderslev